

UEA rendezuis en Unesko

Okaze de la estrarkunsido de UEA, Mark Fettes (prezidanto) kaj Trezoro Huang Yinbao (estrarano kaj redaktoro de Unesko-Kuriero) traveturis Parizon, la 18an de aprilo 2019, por du rendezuoj en Unesko, akompanataj de François Lo Jacomo (reprezentanto ĉe Unesko) kaj Lucas Teyssier (prezidanto de la franca sekcio de TEJO). La diskutoj okazis plejparte en la angla, sed ankaŭ parte en la franca kaj en Esperanto.

Je la 12a akceptis nin Irmgarde Kasinskaite-Buddeberg, program-specialisto en la sektoro pri komunikado kaj informado (sekcio pri scio-socioj), kiu respondecas pri la Internacia Jaro de Indiĝenaj Lingvoj 2019 (IJIL). Mark Fettes prezentis al ŝi UEA kaj niajn planojn okaze de tiu ĉi IJIL kaj de la Universala Kongreso en Montrealo (2020). Ŝi precizigis la eblecojn de partnereco kaj patronado de Unesko. Ŝi atentigis, ke IJIL estis decidita ne nur de Unesko, sed de tuta UN. Responde al la demando, ĉu interesiĝo pri lingvoj daŭros post tiu ĉi jaro 2019, ŝi diris, ke tio dependos de la membro-ŝtatoj, tamen probable jes: almenaŭ la Atlaso de la Lingvoj estas programo por pli ol unu jaro. Interesiĝo pri lingvoj kreskas en Unesko, kaj ankaŭ la ideo pri "jardeko de lingvoj" ne mortis.

Je la 14a30, Vincent Defourny, direktoro de la sekcio pri informado al la publiko, kaj Ian Dennison, fakestro pri publikaĵoj, akceptis nin por preparoli Unesko-Kurieron en Esperanto. Ili scivolis pri la nuna disvastiĝo de Esperanto, kaj estis impresitaj de la raporto, kiun UEA sendis al ili antaŭ du. Kelkajn eldondetalojn ni pridiskutis, kaj la ĵusan alvokon de UEA al ĉiuj Esperanto-organizoj disvastigi la idealojn kaj valorojn de Unesko per Esperanto. Ni ankaŭ petis la rajton traduki al Esperanto alia(j)n Unesko-eldonaĵo(j)n, kaj principe ili konsentis. Pri tradukado de la retejo de Unesko, ĝi estas momente iom labirinta kaj ili konsilas prefere Esperantigi kelkajn vikipediajn artikolojn, kiuj koncernas Uneskon.

Dum la tagmanĝo, ni preparolis niajn aliajn Unesko-agadojn: nia prioritato estas progresigi la akcepton de Esperanto kiel kultura mond-heredaĵo – tion jam akceptis du landoj, Pollando kaj lastatempe Kroatio, tamen ankoraŭ ne Unesko mem. Kaj ni aktive kunlaboras kun lig-komitato de NeRegistaraj Organizoj, interalie en organizado de venontjara Unesko-forumo pri mondcivitaneco. Per tiuj ĉi rendezuoj, ni emfazis, ke nia kunlaborado kun Unesko estas nuntempe aparte grava agadkampo de UEA. (*Raportas, François Lo Jacomo*)